

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 93 - n. 6
NOVEMBRE-DICEMBRE 2014



KRISTNASKO



NATALE DEL SIGNORE

*Il mistero dell'incarnazione
rimane nascosto ai superbi*

*Rileggiamo insieme la conclusione di un
discorso di sant'Agostino sul Natale.*

Colui che sostiene il mondo intero giaceva in una mangiatoia: era un bambino ed era il Verbo. Il grembo di una sola donna portava colui che i cieli non possono contenere. Maria sorreggeva il nostro re, portava colui nel quale siamo, allattava colui che è il nostro pane. Oh grande debolezza e mirabile umiltà, nella quale si nascose totalmente la divinità! Sorreggeva con la sua potenza la madre dalla quale dipendeva in quanto bambino, nutriva di verità colei dal cui seno succhiava. Ci riempia dei suoi doni colui che non disdegnò nemmeno di iniziare la vita umana come noi; ci faccia diventare figli di Dio colui che per noi volle diventare figlio dell'uomo.


NASKO DE LA SINJORO

*La mistero de la enkarriĝo
kaŝiĝas antaŭ la malhumilulo*

*Ni relegu kune la konkludon de parolado
de sankta Aŭgusteno pri la Kristnasko.*

Tiu kiu subtenas la tutan mondon kuŝis en kripo: li estis infano kaj estis la Vorto. La sino de ununura virino portis tiun, kiu la ĉieloj ne povas enteni. Maria subtenis nian reĝon, ŝi portis tiun, en kiu ni estas, ŝi mam-nutris tiun, kiu estas nia pano. Ho granda malforteco kaj admirinda humileco, en kiu plene kaŝiĝis la diecon! Li subtenis per sia povo la patrinon, de kiu li dependis kiel infano, li nutris per vero tiun, el kies sino li suĉis. Plenigu nin per siaj donacoj tiu, kiu eĉ ne disdegnis tiel komenci la homan vivon kiel ni; igu nin filoj de Dio tiu, kiu por ni volis fariĝi filo de la homo.

(el parolado n. 108)



disegno di don Sebastiano Iervolino

Printempa kunveno 2014 – Tria prelego pri EVANGELII GAUDIUM

Tria ĉapitro: La anonco de la Evangelio

Riassunto: Papa Francesco dà indicazioni su chi e come annunciare il Vangelo. Compito dell'annuncio è di ogni battezzato e non soltanto della gerarchia; in tale contesto vanno valorizzate sia la pietà popolare sia i rapporti con il mondo della cultura. Una particolare attenzione viene posta all'omelia durante la celebrazione eucaristica. Alla sua preparazione deve essere dedicato un lungo tempo di studio, preghiera e meditazione. Essa deve essere breve, semplice, chiara.



La evangelizado estas tasko de la tuta popolo pilgrimanta al Dio

En ĉi tiu ĉapitro papo Francisko klarigas, kiu kaj kiel oni devas anonci la Evangelion. Unue li diras, ke la evangelizado estas tasko de la tuta Eklezio, ne nur de la hierarkio, sed de la tuta popolo pilgrimanta al Dio. Due, ke neniu sin savas per si mem. Dio nin altiras al si pere de la rilatoj en homa komunumo.

Ĉiu popolo havas sian kulturon, kaj la kristanismo ne havas sian kulturan mode-

lon: ĝi enradikiĝas en la diversaj kulturoj. La diversaj kulturoj riĉigas la manierojn, per kiu la Evangelio estas anoncata. Kompreneble la mesaĝo, kiun ni anoncas estas vestita de nia kulturo, sed ni ne devas sakramentigi nian kulturon kaj altrudi ĝin al aliaj; ni ne povas pretendi, ke ĉiuj popoloj imitu la manierojn de la eŭropanoj.

La anonco de la Evangelio estas tasko de ĉiu baptito, ĉar per la bapto Dio donas al li

la sento de la fido (*sensus fidei*), kiu helpas lin rekoni tion, kio venas de Dio. Papo Francisko diras, ke la baptito, kiam kredas, estas ne-eraripova (*infallibile in credendo*), ankaŭ kiam li ne havas la ilojn de la klerulo por sin esprimi kun precizeco. La homo, kiu havas sperton pri Dio, ne bezonas multajn instruojn. Vidu la unuajn disĉiplojn aŭ la Samarianinon, kiuj, post la renkontiĝo kun Kristo, anoncis lin al ĉiuj.

Kompreneble, ni ĉiuj devas kreski en la evangelizado, kaj ni mem devas esti daŭre evangelizitaj.

Niaj malperfektaĵoj, ne devas esti ekskuzo por rezigni al nia misio, sed instigo por kreski. Oni povas diri, ke la popolo daŭre evangelizas sin mem.

En ĉi tiu kunteksto, akiras gravecon la popola pietato, per kiu la popolo montras soifon je Dio, soifon, kiun nur la simpluloj kaj la malriĉuloj povas koni, kaj kiu donas al ili sindonemon ĝis la heroeco.

Pilgrimi al la Sanktejoj aŭ al aliaj religiaj manifestacioj, kun la aliaj, kun la filoj, estas evangelizado. Por kompreni tion, ni devas havi la rigardon de la Bona Paŝtisto, kiu ne juĝas, sed amas.

Tiel ni povas kompreni la patrinon, kiu preĝas la rozaron por la filo malsana, aŭ lumigas kandelon antaŭ la bildo de la Madono, ankaŭ se ŝi ne kapablas reciti la Kredon.

Oni ne devas pensi, ke la evangelia anonco devas havi antaŭfiksitaĵojn formojn. Kelkfoje sufiĉas gesto, rakonto, sperto, konversacio, aŭskulto, sed ĉiam kun ĝentileco, respektemo, kaj ankaŭ sen timo, laŭ la apartaj karismoj, kiun la Sankta Spirito donis al ĉiu el ni.

Ankaŭ kiam la diversecoj inter la personoj kaŭzas malfacilaĵojn kaj ĝenojn, ni devas akcepti ilin kiel donaco de la Sankta Spirito por doni dinamismon.

La anonco devas esti direktata ankaŭ al la mondo de la kulturo kaj de la scienco, ĉar ĝi devas atingi ĉiujn. Temas pri la renkontiĝo de la racio kun la fido. Pro tio la teologoj en siaj teologiaj esploroj, devas ĉiam celi

al dialogo kun la mondo de la kulturo kaj de la scienco. Tia tasko estas ankaŭ de la katolikaj universitatoj kaj lernejoj.

La papo pasas poste al parolo pri la formalaj anoncoj, precipe pri la homilio, t.e. la alparolo de la pastro en la celebros de la eŭkaristio. Li diras, ke estas multaj plendoj fare de la fideluloj. Ĉi tiuj donas grandan gravecon al la homilio, sed ĝi kelkfoje estas sufero por la aŭskultantoj kaj ankaŭ por la alparolanto. Pro tio la papo, en 29 paĝoj, donas utilajn indikojn:

- La homilio superas la simplan katekizon, ĉar ĝi estas ene de la eŭkaristia celebros, ĝi estas dialogo de Dio kun sia popolo.
- La homilio ne estas plaĉa spektaklo, sed ĝi devas doni fervoron al la celebros.
- Ĝi devas esti mallonga, ĉar estas ero de liturgia celebros. Homilio tro longa elstaras sur la eŭkaristia liturgia, male, la Sinjoro devas ĉiam brili pli ol la administranto.
- La predikanto devas konscii, ke la Eklezio predikas kiel patrino, kiu parolas al sia filo. La patrino konas la bezonojn de la filo kaj la filo fidus je la patrino.
- Al ĉiuj plaĉas aŭdi paroli en sia patrina lingvo, pro tio oni parolu per la patrina lingvaĵo (patrina dialekto).
- Ankaŭ kiam la homilio estas iom enuiga, havu la patrinan spiriton. Ankaŭ la konsiloj de la patrino estas ofte enuigaj, sed poste ili portas frukton en la koro de la filoj. Jesuo mem parolis laŭ tia spirito.
- La prediko ne estu eksklusive morala kaj doktrina aŭ ekzegeza, sed estu interparolo inter koroj.
- Oni donu sinteze la evangelian mesaĝon: ne multajn ideojn nek ne-interligitajn valorojn.
- La homilio devas doni la ilojn, por ke ĉiu povu daŭrigi sian konversacion kun Dio.

Poste la papo donas sugestojn pri la preparo de la prediko:

- Unue oni devas dediĉi al ĝi longan tempon: tempon por pristudi, preĝi, pripensi, krei. Ankaŭ se la taskoj de la paroĥestro

estas multaj, li devas trovi sufiĉe da tempo por sin dediĉi al la preparado.

- Tiucele estas taŭga la t.n. “*lectio divina*”: legado de la Biblio ene de momento de preĝo, kaj meditado pri tio, kion la biblio diras al ni kaj ne al la aliaj.
- Oni devas bone kompreni la biblian tekston, sur kiu baziĝas prediko; primediti ĝin sen hasto, preterlasante ĉiujn aliajn zorgojn.
- Bone kompreni la vortojn de la biblia teksto kaj ĝian ĉefan masaĝon. Tiuj tekstoj havas du aŭ tri mil jarojn, kaj ne ĉiam estas tuj kompreneblaj de ni.
- Oni devas ami la dian vorton. La pli aŭ malpli granda sankteco de la ministro influas sur la anonco de la Vorto. La popolo preferas atestantojn, kiuj parolas pri Dio, de ili konata kaj amata.
- La predikanto devas emi aŭskulti la homojn, por koni iliajn bezonojn, respondi al iliaj problemoj, uzi ilian lingvon
- Memoru ne respondi al demandoj, kiujn neniu starigas, ne troparoli pri kronikoj por akiri intereson. (Jam estas la ĵurnaloj kaj la televido por tio).
- Bona homilio devas enteni: ideon, senton, bildon. (Oni devas lerni paroli per bildoj).
- Diris Paŭlo la 6a: “Bona prediko estu simpla, klara, rekta, taŭga”. Notu, ke simpleco kaj klareco estas du malsamaj kvalitoj. Prediko povas esti simpla, sed ne klara por manko de logiko, aŭ ĉar oni parolas samtempe pri diversaj aferoj.
- Ne uzu teknikajn vortojn lernitajn dum la teologiaj studoj, kaj kiujn la popolo ne povas kompreni.
- Uzu pozitivan lingvaĵon. Pli ol diri tion,



kion oni ne devas fari, diri tion, kion oni povas fari pli bone.

La lasta temo pritraktita en ĉi tiu ĉapitro rilatas la pliprofundigon de la kerigmo, tio estas de la fundamenta anonco de nia fido: tio estas, la anonco, ke Dio amas nin, kaj ke pro tio ni amas Dion kaj la proksimumon. Por proponi tiun anoncon kaj helpi al ĝia akceptado, ĝi havu kvar kvalitojn: apudecon, malfermecon al dialogo, paciencon, indulgan akceptemon.

Krome, estas bone, ke en la katekizo oni priententu al la vojo de la beleco: sekvi Jesuon ne estas nur juste kaj vere, sed ankaŭ bele. De tio la instigo al la Eklezio por ke ĝi subtenu la artojn en iliaj diversaj formoj, ankaŭ ne tradiciaj, se ili montriĝas aparte allogaj por la fideluloj.



La redazione di Katolika Sento augura a tutti un Natale di pace ed un felice Anno Nuovo

La redakcio de Katolika Sento bondeziras al ĉiuj pacan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron





MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

ONORA LE TUE ORIGINI

Creato nella libertà di scegliere, l'uomo corre il rischio di vivere fuori dalla realtà. Ogni peccato compiuto dall'uomo ha la sua origine nella fantasia che fa a pugni con la realtà. Stare con i piedi per terra e vivere una vita lunga e felice sembra un sogno, un'impresa al di là di ogni previsione.

La seconda tavola dei dieci comandamenti, tutta imperniata sul non offendere in nessun modo il prossimo, inizia con il comando: «*Onora tuo padre e tua madre, perché si prolunghino i tuoi giorni nel paese che il Signore, il tuo Dio, ti dà*» (Es. 20, 12). Ciò che precede tutta una serie di proibizioni è un'attenzione a «*onorare*» il proprio padre e la propria madre.

Se non ci fermiamo alla sola figura del padre e della madre come il prossimo più prossimo, possiamo scoprire che l'onore è dovuto soprattutto ai nostri genitori in quanto ci hanno generato. Piaccia o non piaccia, lo si voglia o non lo si voglia, noi non veniamo dal nulla e nemmeno da una stella, ma abbiamo avuto un'origine da persone concrete con nome e cognome, limitate e fragili, che possono ammalarsi, invecchiare e morire. Il nostro inizio personale non è nell'immaginario o nel vago da poter fantasticare sul nostro presente e sul nostro futuro. Qui ci viene chiesto di accettare la nostra origine umana. I genitori, infatti, sono la viva memoria che noi non siamo quello che pensiamo, quello che ci piacerebbe essere, quello che ci illudiamo di diventare; loro ci ricordano, tacitamente, di che pasta siamo

HONORU VIAN ORIGINON

Kreita en la libero elekto, la homo riskas vivi ekster la realo. Ĉiu peko farita de la homo originas el la fantazio, kiu akre kontrastas kun la realo. Stari kun ambaŭ piedoj sur la tero kaj vivi longan kaj feliĉan vivon aspektas revo, entrepreno preter ĉia antaŭvido.

La dua tabulo de la dek ordonoj, tute pivotigita en la ne-ofendo de la proksimumo, komenciĝas per la ordono: «*Honoru vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo en la lando, kiun la Sinjoro, via Dio, donas al vi*» (Eli, 20, 12). Tio, kio antaŭas la tutan serion de malpermesoj, estas atentigo al «*honori*» proprajn patron kaj patrinon.

Se ni ne haltas je la nuraj figuroj de la patro kaj de la patrino kiel la plej proksimaj proksimumoj, ni povas malkovri, ke la honoro estas ŝuldenda nepre al niaj gepatroj, ĉar ili naskis nin. Plaĉe aŭ neplaĉe, vole aŭ ne-vole, ni ne venas el nenio kaj eĉ ne el stelo, sed ni originis el konkretaj personoj kun antaŭnomo kaj familia nomo, limigitaj kaj fragilaj, kiuj povas malsaniĝi, maljuniĝi kaj morti. Nia persona komenciĝo ne estas en la imaga aŭ nedifinita mondo, tiel ke ni povas fantaziumi pri niaj nuntempo kaj estonteco. De ni oni petas do, ke ni akceptu nian homan originon. La gepatroj, fakte, estas la viva memoro, ke ni ne estas tio, kion ni pensas, kio plaĉus al ni esti, tio, kio ni iluziiĝas fariĝi; ili memorigas al ni, senvorte, kiel konkrete ni estas faritaj, kaj kiel ni povos fariĝi, mal-

fatti e come possiamo diventare, impeden-
doci di perderci tra le nuvole, nell'illusione.

In ebraico «*onorare*» significa “dare peso”, “considerare importante”. Il quarto comandamento vuole che evitiamo in tutti i modi di sottovalutare la radice da cui siamo nati, che onoriamo le nostre origini umane, che teniamo in giusta considerazione la concretezza della vita umana.

San Paolo nella sua lettera agli Efesini scrive: «*“Onora tuo padre e tua madre!”*. *Questo è il primo comandamento che è accompagnato da una promessa: “perché tu sia felice e goda di una lunga vita sulla terra”*» (Ef. 6, 2-3). Il rischio di uscire dalla realtà, di sottovalutare le tentazioni, di esaltarsi oltre misura è normale. Dio stesso si è premurato di avvisare l'uomo a tener in debito conto la sua situazione di fragilità, considerando attentamente le sue vere origini. Questo vale soprattutto per gli Ebrei, i quali ritengono che dal poco non può nascere il molto, dal piccolo non può uscire il grande, da genitori umani non nascono divinità. Una regola veramente saggia e utile per vivere più a lungo e più felici.

Come esperantisti siamo orgogliosi di usare una comune lingua internazionale, collaudata da molti anni e in grado di mettere tutti sullo stesso livello per una comprensione immediata, reciproca e con poca spesa, ma non vogliamo mai dimenticare il valore insostituibile della lingua materna, quella che ci ha trasmesso direttamente e con chiarezza emozioni e sentimenti, immagini e concetti, storie e nozioni. Onoriamo dunque la lingua materna per lanciare ponti con gli altri uomini di ogni nazione e lingua attraverso l'adozione della lingua internazionale esperanto.

In breve: onorare le nostre umili origini e dar peso alla lingua materna diventa garanzia di lunga vita.

permesante al ni, ke ni perdiĝu en la nuboj, en la iluzio.

En la hebrea lingvo «*honori*» signifas “doni valoron”, “konsideri grava”. La kvara ordono petas, ke ni evitu ĉiumaniere subtaksi la radikon, el kiu ni naskiĝis, ke ni honoru nian homan originon, ke ni tenu en taŭga konsidero la konkretecon de la homa vivo.

Sankta Paŭlo en sia letero al la Efezanoj skribis: «*“Honoru vian patron kaj vian patrinon!”*. *Ĝi estas la unua ordono akompanata de promeso: “por ke vi estu feliĉa kaj ĝuu longan vivon sur la tero”*» (Efe 6, 2-3). La riskoj eliri el la realo, subtaksi la tentojn, ekzaltiĝi supermezure estas normalaj. Dio mem zorgis averti la homon, ke li tenu en ĝusta konsidero sian situacion de fragileco, atente rigardante sian veran originon. Ĉi tio valoras precipe por la Hebreoj, kiuj opinias, ke el la malmulto ne povas eliri la multo, el la etulo ne povas eliri la grandulo, de homaj gepatroj ne povas naskiĝi diaj filoj. Tiu ĉi estas regulo vere saĝa kaj utila por vivi pli longe kaj pli feliĉaj.

Kiel esperantistoj ni fieras uzi komunan internacian lingvon, elprovida per multaj jaroj kaj kapabla meti ĉiujn homojn je la sama nivelo por senpera reciproka kaj malmultekosta kompreno, sed ni volas neniam forgesi la neanstataŭeblan valoron de la patrina lingvo, kiu rekte kaj klare al ni transdonis emociojn kaj sentemojn, bildojn kaj konceptojn, rakontojn kaj nociojn. Honoru ni do la patrinan lingvon por lanĉi pontojn al la aliaj homoj de ĉiuj nacio kaj lingvo per la alprenado de la internacia lingvo Esperanto.

Mallonge: honori nian humilan originon kaj konsideri grava la patrinan lingvon iĝas garantio de longa vivo.

Dirite inter ni ...



042

LIBERTEMPO

- Baldaŭ venos libertempo.
- Bonŝance, ĉar mi estas tre laca.
- Ĉu ankaŭ vi?
- Jes, mi laboris multe dum la lastaj monatoj.
- Kaj nun vi atendas la Kristnaskan libertempon.
- Jes.
- Ĉu vi intencas ĝui vian libertempon eksterlande?
- Tute ne, ĉar – kiel mi diris – mi estas laca.
- Ĉu vi restos hejme?
- Certe: mi restos hejme kaj mi ripozos la tutan tagon.
- Kaj vi vekiĝos vespere.
- Nu, ripozi ne signifas dormi la tutan tagon.
- Kaj kion vi faros?
- Mi legos belan libron, kaj diskutos kun miaj familianoj, mi akompanos mian nepeton, mi ludos kun li.
- Nu, vi havas belan programon.
- La grava afero estas forgesi la laboron.
- Estas tio, kion ankaŭ mi klopodos fari.
- Kaj vespere mi enlitiĝos frue.
- Se vin ne allogos ia televid-programo.
- Tio ne estos facila.
- Ĉu vi ne atentis televid-programojn?
- Nu, se mi decidis, ke mi devas dormi, mi dormas.
- Kaj neniun vekos vin.

VACANZE

- Presto arriveranno le vacanze.
- Per fortuna, perché sono molto stanco.
- Anche tu?
- Sì, ho lavorato molto durante gli ultimi mesi.
- Ed ora aspetti le vacanze di Natale.
- Sì.
- Intendi goderti le tue vacanze all'estero?
- Nient'affatto, perché – come ho detto – sono stanco.
- Rimarrai a casa?
- Rimarrò a casa e riposerò tutto il giorno.
- E ti sveglierai la sera.
- Beh, riposare non significa dormire tutto il giorno.
- E cosa farai?
- Leggerò un bel libro, discuterò con i miei familiari, accompagnerò il nipotino, giocherò con lui.
- Bene, hai un bel programma.
- La cosa importante è dimenticare il lavoro.
- E ciò che anch'io cercherò di fare.
- E la sera mi metterò presto a letto.
- Se non ti inviterà qualche programma televisivo
- Non sarà facile.
- Non fai attenzione ai programmi televisivi.
- Beh, se decido che devo dormire dormo.
- E nessuno ti sveglierà.

- Neniu vekos min.
- Kaj ĉu ĉio iros glate, laŭ la programoj?
- Mi esperas, se ne okazos io neantaŭvidita.
- Ekzemple?
- Miaj familianoj ĉiam havas ideojn
- Ĉu je Kristnasko vi tagmanĝos kun via parencaro?
- Laŭ la programo, oni partoprenos en la noktomeza Sankta Meso.
- Vi iros dormi malfrue.
- Jes, kaj ni ankaŭ vekiĝos malfrue.
- Kiu preparos la manĝaĵon?
- Ni ne manĝos hejme, ni manĝos ekstere, ĉe la bopatro de mia filo.
- Tio signifas, ke vi ne estos en Milano, ĉar via filo kaj ties bopatro loĝas en Brescia (pr. Breŝja).
- Ho, jes, sed kun mia filo en Brescia estas kiel esti en mia hejmo, en Milano.
- Ha, jene!
- Jes, tiel estas.
- Tio signifas, ke ankaŭ se vi iros al la montara domo de via filo, vi ripozos.
- Tie mi ripozus eĉ pli multe.
- Ĉu vere?
- Kompreneble.
- Kial?
- Ĉar estas vintro kaj la suno vidigas sin iom antaŭ la deka horo.
- Ĉu tiom malfrue?
- Jes, la montoj ne permesas vidi la sunon antaŭe, ankaŭ se estas hele.
- Sed malvarme, mi imagas.
- Ho jes, tre malvarme
- Kaj se neĝos?
- Pli bone!
- Kial?
- Ĉar mi eĉ ne profitos pri la suno, kiu brilas proksimume ĝis la kvara.
- Nessuno mi sveglierà.
- E tutto filerà liscio, secondo i programmi?
- Spero, se non succederà qualcosa di inatteso.
- Ad esempio?
- I miei familiari hanno sempre delle idee.
- A Natale pranzerai con i tuoi parenti?
- Secondo il programma, si parteciperà alla Santa Messa di mezzanotte.
- Andrete a dormire tardi.
- Sì, e anche ci sveglieremo tardi.
- Chi preparerà da mangiare?
- Non mangeremo a casa, mangeremo fuori, dal suocero di mio figlio.
- Questo significa che non sarai a Milano, perché tuo figlio e suo suocero abitano a Brescia.
- Ho, sì, ma con mio figlio a Brescia è come essere a casa mia, a Milano.
- Ah, così!
- Sì, è così.
- Ciò significa, che anche se andrai nella casa di montagna di tuo figlio, riposerai.
- Là riposerei persino di più.
- Davvero?
- Naturalmente.
- Perché?
- Perché è inverno ed il sole si fa vedere un po' prima delle dieci.
- Così tardi?
- Sì, i monti non permettono che si veda prima il sole, anche se fa chiaro.
- Ma freddo, immagino.
- Ho, sì, molto freddo.
- E se nevicherà?
- Meglio!
- Perché?
- Perché non approfitterò neanche del sole, che brilla all'incirca fino alle quattro.



NEĜO

- Neĝis la tutan nokton.
- Ĉu vere?
- Jes, se vi rigardas tra la fenestro, ĉio estas kovrita de blanka tavolo.
- Vi pravas, neĝis vere tre multe.
- Ni venis al la montaro por ĝui la neĝon.
- Vi pravas, ĝuste por la neĝo ni venis.
- Kaj nun, nur post du tagoj, ni havas ĝin.
- Ni estas bonŝancaj.
- Tio estis antaŭvidita.
- Tion ni esperis.
- Oni ĉiam devas fidi.
- Kaj nun?
- Nun ni devas prepari nin alfronti la neĝon.
- Ho, ni havas ĉion, al mi ŝajnas.
- Jes, ni havas taŭgajn botojn.
- Kaj ni havas sledon.
- Ĝuste pro tio, mi diris, ke ni havas taŭgajn botojn.
- Ĉar por trovi la gustan lokon por sledumi, oni devas marŝi en la neĝo.
- Kaj la neĝo estas freŝa.
- Tio signifas, ke niaj gamboj eniros en la neĝon ĝis la genuoj.
- Ne troigu: ne falis tiom multe da neĝo.
- Vi pravas.
- Laŭ tio, kion oni vidas sur tiu tegmento, falis dudek aŭ tridek centimetroj da neĝo.
- Tio estas sufiĉa por la momento.
- Kaj morgaŭ la neĝo estos malpli supla, kaj oni glitos pli bone.

NEVE

- Ha nevicato l'intera notte.
- Davvero?
- Sì, se guardi dalla finestra tutto è coperto da un manto bianco.
- Hai ragione, ha nevicato veramente tanto.
- Siamo venuti in montagna per goderci la neve.
- Hai ragione, siamo venuti proprio per la neve.
- Ed ora, dopo solamente due giorni, ce l'abbiamo.
- Siamo fortunati.
- Era previsto.
- Lo speravamo.
- Si deve sempre aver fiducia.
- E adesso?
- Ora ci dobbiamo preparare ad affrontare la neve.
- Oh, abbiamo tutto, mi sembra.
- Sì, abbiamo gli stivali adatti.
- Ed abbiamo una slitta.
- Proprio per questo ho detto che abbiamo gli stivali adatti.
- Perché per trovare il luogo giusto per andare in slitta, si deve marciare nella neve.
- E la neve è fresca.
- Ciò significa che le nostre gambe entreranno nella neve fino alle ginocchia.
- Non esagerare: non è caduta così tanta neve.
- Hai ragione.
- Secondo quello che si vede su quel tetto, sono caduti venti o trenta centimetri di neve.
- Per il momento questo è sufficiente.
- E domani la neve sarà meno soffice e si scivolerà meglio.

- Hodiaŭ ni provu nian glitveturilon.
- Prave. Ni profitu je la vetero.
- Laŭ mi, kun iom da nuboj kaj kun la monto, kiu ŝirmas la valon de la suno, baldaŭ ni havos tre bonan glitgrundon.
- Sed mi esperas, ke je la 11.a horo venos ankaŭ iom da suno.
- Ĝuste por kontentigi vin.
- Kaj la skioj?
- Kial vi demandas pri la skioj?
- Ĉar post iom da sledo estus bele skiadi.
- Nu, la skiojn ni kunhavas.
- Ni aranĝu bone la aferojn.
- Jes, ni povus iri peraŭtomobile iom pli alten.
- Ĉu tien, kie ni estis hieraŭ?
- Jes, ĝuste tie: tie estas taŭga loko ĉu por glitiri ĉu por skiadi.
- Bone, ni glitumos dum unu aŭ du horoj kaj poste ni uzos la skiojn.
- Kaj ni skiados ĝis la lumo tion ebligos.
- Tio estas bona programo.
- Kaj ni sekvos ĝin.
- Kaj tio estos granda amuzo.
- Estas tio, kion ni bezonas post multaj tagoj de streĉa laboro.
- Ek, ni iru!
- Ĉu vi estas certa, ke vi kunprenis cion?
- Ĉu vi volas kontroli ankoraŭfoje?
- Estus oportune, konsiderante vian forgesemecon.
- Sed fidu, almenaŭ unu fojon!
- Bone, mi fidas.
- Ni iru!
- Oggi proviamo la nostra slitta.
- Gusto. Approfittiamo del tempo.
- Secondo me, con un po' di nubi e col monte che protegge la valle dal sole, presto avremo un terreno molto buono per scivolare.
- Ma spero che alle 11 verrà anche un po' di sole.
- Proprio per accontentarti.
- E gli sci?
- Perché chiedi degli sci?
- Perché dopo un po' di slitta sarebbe bello sciare.
- Beh, gli sci li abbiamo con noi.
- Combiniamo bene le cose.
- Sì, potremmo andare, con l'automobile un po' più in alto.
- Là dove siamo stati ieri?
- Sì, proprio là: lì c'è un luogo adatto sia per andare in slitta sia per sciare.
- Bene, slitteremo per una-due ore e poi useremo gli sci.
- E scieremo finché la luce lo permetterà.
- È un buon programma.
- E lo seguiremo.
- E sarà un gran divertimento.
- È ciò di cui abbiamo bisogno dopo molti giorni di lavoro stressante.
- Su, andiamo!
- Sei certo di aver preso tutto?
- Vuoi controllare ancora una volta?
- Sarebbe opportuno, considerando la tua tendenza a dimenticare.
- Ma fidati, almeno una volta!
- Bene, mi fido.
- Andiamo !



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

QUANTE VOLTE HA BUSSATO

*Come il pastore tra vallate e forre
va cercando la pecora smarrita
e non si acquieta se non l'ha trovata
così il Signore insegue chi è travolto
nei gorghi della notte e del terrore.*

*Quante volte il Signore mi ha cercato
e l'ho sentito ma non ho risposto.
Da lontano ho sentito la sua voce
quando con insistenza mi chiamava
ma sono stato sordo al suo richiamo.*

*Quante volte ha bussato alla mia porta!
Adesso che il dolore mi tormenta
e mi avvolge una caligine densa
come oserò levare la mia voce,
per invocarlo e chiedergli sostegno?*

(Gianni Andreotti 1999)

KIOMFOJE LI FRAPIS

*Kiel tra valoj kaj krutaĵoj iras
ŝafisto serĉe de la ŝaf' perdita
kaj ne trankvilas, se li ĝin ne trovas
tiel traserĉas la Sinjoro homon
de la noktaj teruroj delogitan.*

*Kiomfoje min serĉis la Sinjoro,
sed, lin aŭdinte, ne respondis mi.
Aŭdadis mi defore lian voĉon,
kiam insiste li al mi sin turnis,
sed ĉe l' alvoko lia mi surdiĝis.*

*Kiomfoje li frapis je la pordo!
Nun, kiam la doloro min turmentas
kaj min envolvas en densa mallumo,
kiel kuraĝos mi levi la voĉon,
por lin alpreĝi kaj peti subtenon?*


(esperantigis G. Daminelli)



HAJKO

*Baldaŭ Kristnasko.
Jam fone traviĝas
la sankta Pasko.*

(Giovanni Daminelli 2014)





UT UNUM SINT

Dall'udienza generale di mercoledì 8 ottobre dove papa Francesco sembra riprendere i temi del nostro congresso ecumenico.

El la ĝenerala aŭdienco de merkredo la 8-an de Oktobro, kie papo Francisko ŝajnas repreni la temojn de nia ekumena kongreso.

http://w2.vatican.va/content/francesco/it/audiences/2014/documents/papa-francesco_20141008_udienza-generale.html

Ci sono tanti fratelli che condividono con noi la fede in Cristo, ma che appartengono ad altre confessioni o a tradizioni differenti dalla nostra. Le divisioni tra i cristiani, mentre feriscono la Chiesa, feriscono Cristo, e noi, divisi, provochiamo una ferita a Cristo: la Chiesa infatti è il corpo di cui Cristo è capo. Sappiamo bene quanto stesse a cuore a Gesù che i suoi discepoli rimanessero uniti nel suo amore. Basta pensare alle sue parole nella preghiera rivolta al Padre nell'imminenza della passione: «Padre santo, custodisci nel tuo nome, quelli che mi hai dato, perché siano una sola cosa, come noi» (*Gv 17,11*). Questa unità era già minacciata mentre Gesù era ancora tra i suoi: nel Vangelo, infatti, si ricorda che gli apostoli discutevano tra loro su chi fosse il più grande, il più importante.

Durante il suo cammino nella storia, la Chiesa è tentata dal maligno, che cerca di dividerla, e purtroppo è stata segnata da separazioni gravi e dolorose. Le ragioni che hanno portato alle fratture e alle separazioni possono essere le più diverse. Quello che è certo è che, in un modo o nell'altro, dietro queste lacerazioni ci sono sempre la superbia e l'egoismo, che sono causa di ogni disaccordo e che ci rendono intolleranti, incapaci di ascoltare e di accettare chi ha una visione o una


Estas multaj fratoj, kiuj kunpartigas kun ni la fidon en Kristo, sed apartenantaj al aliaj konfesioj aŭ tradicioj malsamaj ol la nia. La disigoj inter la kristanoj, vundante la Eklezion, vundas ankaŭ Kriston mem, kaj ni, disigitaj, kaŭzas vundon en Kristo: la Eklezio fakte estas korpo, kies kapo estas Kristo. Ni bone scias, kiom Jesuo plenkore deziris, ke liaj disĉiploj restu unuiĝintaj en lia amo. Sufiĉas pensi pri iliaj vortoj dum la preĝo adresita al Patro en la proksimeco de la pasiono: «Patro Sankta, gardu en via nomo tiujn, kiujn vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni.» (*Joh 17,11*). Ĉi tiu unuiĝo jam estis minacata, kiam Jesuo estis ankoraŭ inter la siaj: fakte, en la Evangelio, oni raportas, ke la apostoloj diskutis inter si, pri kiu estas la plej granda, la plej grava.

Dum sia irado en la historio, la Eklezio estas tentata de la diablo, kiu klopodas ĝin disigi, kaj bedaŭrinde ĝi suferis gravajn kaj dolorigajn disigojn. La kialoj, kiuj kaŭzis la rompojn kaj la disigojn, povas esti la plej malsamaj. Estas certe ke, iamaniere aŭ alimaniere, malantaŭ ĉi tiuj disŝiraĵoj, ĉiam estas malhumilo kaj egoismo, kiuj estas la kialo de ĉiu malkonsento kaj kiuj igas nin maltoleremaj, nekapablaj aŭskulti kaj akcepti tiun, kiu havas vidpunkton aŭ pozicion malsaman

posizione diversa dalla nostra.

Ora, di fronte a tutto questo, c'è qualcosa che ognuno di noi, come membri della santa madre Chiesa, possiamo e dobbiamo fare? Senz'altro non deve mancare la preghiera per l'unità dei cristiani. E insieme con la preghiera, il Signore ci chiede una rinnovata apertura: ci chiede di non chiuderci al dialogo e all'incontro, ma di cogliere tutto ciò che di valido e di positivo ci viene offerto anche da chi la pensa diversamente da noi o si pone su posizioni differenti. Ci chiede di non fissare lo sguardo su ciò che ci divide, ma piuttosto su quello che ci unisce, cercando di meglio conoscere e amare Gesù e condividere la ricchezza del suo amore. E questo comporta concretamente l'adesione alla verità, insieme con la capacità di perdonarsi, di sentirsi parte della stessa famiglia cristiana, di considerarsi l'uno un dono per l'altro e fare insieme tante cose buone, e opere di carità.

È un dolore, ma ci sono cristiani divisi, ci siamo divisi fra di noi. Ma tutti abbiamo qualcosa in comune: tutti noi crediamo in Gesù Cristo, il Signore. Tutti crediamo nel Padre, nel Figlio e nello Spirito Santo, e tutti camminiamo insieme, siamo in cammino. Aiutiamoci l'un l'altro!



ol la nia.

Nun, antaŭ ĉio ĉi, ĉu estas io, kio ĉiu el ni, kiel membroj de la sankta patrineca Eklezio, povas kaj devas fari? Sendube, ne devas manki la preĝo por la unuiĝo de la kristanoj. Kaj kune kun la preĝo, la Sinjoro petas de ni renoviĝintan malfermecon: li petas nin, ne malrespondi al dialogo kaj al renkontiĝo, sed kapti ĉion, kio estas al ni proponata kiel valida kaj pozitiva, ankaŭ de tiu, kiu pensas malsame ol ni aŭ sin metas en malsamajn poziciojn. Li petas nin, ne koncentri nian rigardon sur tio, kio nin apartigas, sed prefere sur tio, kio nin kunigas, klopodante koni kaj ami Jesuon pli bone kaj kunpartigi la riĉaĵon de lia amo. Kaj ĉi tio implicas konkrete la aliĝon al la vero, kune kun la kapablo pardoni, sin senti parto de la sama kristana familio, sin konsideri donaco unu por la alia kaj fari kune multajn bonajn aferojn kaj bonkorajn agadojn.

Tio estas sufero, sed estas kristanoj disigitaj, ni disiĝas inter ni. Sed ni ĉiuj havas ion komunan: ni ĉiuj kredas je Jesuo Kristo, la Sinjoro. Ni ĉiuj kredas je la Patro, je la Filo kaj je la Sankta Spirito, kaj ni ĉiuj paŝas kune, ni pilgrimas. Ni helpu nin reciproke!

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone di n° 3 premi da 300,00 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI

CONGRESSO UECI 2015

La Spezia: 22-25 maggio – Tema: "Quale famiglia?"


Il congresso UECI del prossimo anno si terrà a La Spezia presso la Casa per Ferie "Il Gabbiano" Piazzale Giovanni XXIII, 1 da venerdì 22 al lunedì 25 maggio. Il luogo si trova in centro città, dietro la Cattedrale di Cristo Re, ed è facilmente raggiungibile sia dalla stazione FS, sia dall'autostrada.

Tratteremo il tema della famiglia, alla luce del "Sinodo straordinario sulla famiglia" svoltosi a settembre. L'argomento, particolarmente attuale, sarà oggetto di studio per l'intero anno prossimo per volere di papa Francesco.

Per contenere i costi (180 € camera doppia e 200 € per la singola + 20 € di iscrizione) si è deciso di finire il congresso di lunedì anziché martedì, tuttavia non mancheranno escursioni interessanti trovandoci in una località turistica.

Prenderemo accordi con l'albergatore per chi volesse trattenersi più a lungo.


Nel prossimo numero troverete l'aligilo e ulteriori precisazioni.



La Spezia: Cattedrale di Cristo Re

CONGRESSO ECUMENICO 2015

Strasburgo: 1-8 agosto – Tema: "Dammi da bere"



Strasburgo: Chiesa protestante di Saint Paul

Anche il prossimo anno si terrà un congresso ecumenico e sarà a Strasburgo presso la casa della gioventù "Ciarus" (rue Finkmatt, 7) che è in prossimità del centro città ed è facilmente raggiungibile dalla stazione. La data dal 1 al 8 agosto si colloca immediatamente dopo l'Universala Kongreso di Lilla per dare la possibilità a chi vuole di partecipare ai due congressi.

Il tema proposto, "Dammi da bere" (Gv 4, 7), è quello scelto per la *Settimana di preghiera per l'unità dei cristiani* e riprende l'episodio evangelico della Samaritana da intendersi quale invito a gustare l'acqua dai divesi pozzi e offrire la nostra, arriccendoci così l'un l'altro attraverso la nostra diversità.

Prezzi per gli occidentali. Iscrizione: 50 euro (60 dopo il 30 giugno); soggiorno: 420 euro (480 se in camera singola). Potete chiedere l'aligilo al presidente dell'UECI.

Gli aligiloj ai due congressi si possono scaricare dal nostro sito: <http://www.ueci.it/aligxiloj/>

ELEZIONI

Il prossimo anno si deve rinnovare il Comitato Centrale UECI.

A tale proposito il nostro statuto recita:

Per l'eleggibilità è richiesto che ogni candidato: abbia compiuto il 16° anno di età; sia iscritto all'U.E.C.I. da almeno due anni consecutivi, compreso quello in corso; sia presentato da un Presidente di Gruppo o da tre membri del Comitato Centrale uscente o da almeno dieci Associati aventi diritto di voto.

Chiunque ne abbia i requisiti e si voglia candidare è pregato di comunicarlo al segretario dell'UECI entro il 15 marzo 2015. Per la raccolta delle firme di sostegno alla presentazione della candidatura ci si può rivolgere al presidente dell'UECI.

Indirizzo del segretario UECI:

Marco Politi via Montemartini, 4 - 20139 Milano - markpol00@yahoo.it

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2015

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a Katolika Sento (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ciuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humuraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it - sendis Tiziana Fossati)

Geedzoj

Geedzoj kverelas malamike. Fine li ekkrias:

- Mi tre miras pri mi, pro tio, ke mi edziĝis kun virino kiel vi, kiu edziniĝis kun viro, kiu ne rifuzis edziĝi kun virino kiel vi.

Verda almozulo

Juna esperantisto kun verda stelo sur la brusto almozpetas sur la strato. Pasas riĉa esperantisto kaj diras al li:

- Ĉu vi ne hontas, stari ĉi tie nenion farante? Prefere iru labori por gajni monon... Mi bezonas laboristojn. Kutime mi pagas al laboristo tridek eŭrojn tage, sed, ĉar vi estas esperantisto, mi pagos al vi kvardek eŭrojn tage.
- Mi vidas, ke mi plaĉas al vi. Prefere donu al mi ĉiutage dek eŭrojn kaj laborigu ne-esperantiston kontraŭ nur tridek eŭroj.

Ĉiam pli malbone

Policisto haltigas aŭtomobilon kun familio:

- Vi veturis tro rapide. Montru la stir-raĵtigilon!
- Via kolego jam forprenis ĝin la pasintan monaton. Ĉu li perdis ĝin?

Intervenlas la edzino:

- Policano, ne atentu pri tio, kion li diras: li estas ebria!

La policano ordonas:

- Eliru tuj kaj spiru en tiun ĉi aparaton!

Komentas la knabo sidanta malantaŭe:

- Mi diris, ke oni devas esti pli prudentaj, kiam oni veturas en ŝtelita aŭto!

En Aŭstralio

- Mi vidas, ke vi aĉetis novan bumerangon.
- Jes. Sed, mi ne sukcesas forĵeti la malnovan.

(sendis Carlo Sarandrea)

AIS-ekzameno

Ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj, studento ekzameniĝas pri anatomio. Profeso demandas lin pri montrita organo kaj la studento respondas:

- Tio ĉi estas la epaton.
- Unue oni ne diras *epaton*, sed *hepaton*; due oni ne diras “estas la *hepaton*”, sed “estas la *hepato*”; trie ĝi ne estas la *hepato*, sed la *pankreato*.

Marĉandado

- Kiom kostas ĉi tiu paro de ŝuoj?

- 24,50 eŭrojn
- Tro multe, mi estas preta pagi 20,00 eŭrojn.
- Mi ne malaltigas la prezon. Temas pri bonkvalitaj ŝuoj.
- Mi donos al vi 22,00.
- Mi ne povas malaltigi eĉ unu centimon; la prezo jam estas malalta.
- Prenu do 24,50 eŭrojn. Sed ĉu vi ne povis diri ke ili kostas 30,00?

Reklamo en ĵurnalo

Funebraĵoj je rabatitaj prezoj. Nur 800 eŭroj, ĝis la fino de la monato. Rapidegu!

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2014/

